# Esperanto en Danio

17-a jarkolekto • n-ro 4 • septembro 2010



Danaj UK-partoprenantoj en Kubo

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Regin Larsen
Ole Therkelsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
Retadreso: eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.11.2010**

# Enhavo

**La devontiga transdono .........3**
**Impresoj pri la 95-a UK............4**
**Kubaj travivaĵoj .......................5**
**Kubismo estas superrealismo 6**

**Mallonga historio de Kubo......9**
**Elektojaro de UEA..................12**
**“Tutmonda Esperanto”..........13**

**Paperaj gazeteltondaĵoj.........14**
**Næstved.................................15**
**Kopenhago.............................16**

**Somera Esperanto-Studado..17**
**PIV en la reto!.........................18**
**Nur 0,49 kronojn.....................19**

# La devontiga transdono



La tradicia transdono de la kongresa flago okazis kiel kutime dum la fermo de la kongreso, fare de la prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio kaj LKK Julián Hernández Angulo. Tiu ceremonio simbole spronas nin persiste labori dum la venonta jaro, por certigi sukcesan kongreson.

**Pluraj taskoj estas jam faritaj, sed pli multaj atendas nin. Unu el la gravaj taskoj estas havigi bezonatan nombron da helpantoj dum la kongresa semajno. Pluraj membroj jam deklaris sian volon helpi, sed ni bezonas pli da helpantoj. Pro tio ni jam nun petas ĉiujn membrojn kiuj interesiĝas pri tiu por ni tre grava tasko, informi nin pri ilia preteco volontuli.**

**Dum la kongresa semajno ni devos prizorgi giĉetojn pri informado, dokumentoj, loĝado, bankedo kaj ekskursoj, ĉiĉeronado dum ekskursoj, organizado de informa tabulo, helpo dum amasaj aranĝoj, preparo de la kongresaj materialoj kaj aliaj…**

**Bonvolu elekti la plej taŭgan por vi taskon kaj sendi retpoŝtan aŭ poŝtan respondon al**

**96uk@esperanto.dk**

**kaj ni provos kontentigi vin. Personoj kiuj loĝas ekster Kopenhago, bonvolu indiki ĉu vi mem havas loĝeblecon en la urbo, aŭ ĉu LKK prizorgu malmultekostan loĝejon. Nome de LKK mi antaŭdankas.**

***Ileana Schrøder***

# Impresoj pri la 95-a UK

Ni estis 12 partoprenantoj de Danio, kiuj flugis al la 95-a Universala Kongreso en Kubo en julio. Estas mia tria kongreso kaj ĉi-foje mi sentis min "en la ĝusta loko", inter (ĉi-jare) 1000 amikoj el 59 landoj kun kiuj oni povas paroli! Por mi iom nekredeble – sed mi alkutimiĝas.

Por mi partopreni kongresojn enhavas du partojn, la kongresan programon kaj la renkontiĝon kun fremduloj. Ambaŭ ĉi-jare estis laŭ mi sukcesaj.

La programo estis kiel antaŭe plenplena de interesaj aferoj kaj estis tre malfacile elekti en kio partopreni. Mi aŭdis pri japana arto – paktuko – tre interesa kaj ne-kutima por danoj. Temis pri uzado de tukoj por enpaki objektojn – botelojn, akvomelonon ktp. Origamio – kompreneble ankaŭ tre interesa, kaj finfine unu tre interesa prelego pri kimonoj, ilia signifo kaj kiamaniere surmeti kimonon.

La "hispana eksprese" estis, kiel pasintjare en Bjalistoko – pola eksprese, tre interesa sed ne tre facila.

Mi iris al la "Esperantologia konferenco" kaj aŭskultis tri tre diversajn prelegojn. Bedaŭrinde mi tute ne komprenis pri kio temas la unua – sed la aliaj aŭskultantoj estis kontentaj, do mi havas celon por estontaj progresoj – esperante kaj intelekte. La du sekvaj prelegoj estis de Humphrey Tonkin – kiel kutime facile komprenebla kaj interesa, kaj la lasta temis pri uzado de Esperanto kiel pontolingvo: traduko de kroata infanlibro el Esperanto en la hindan kaj de hinda infanlibro kroaten. Tre mirinda projekto.

Mi, kiel sufiĉe nova esperantisto, bedaŭrinde laciĝas tiel multe dum la tago, parolante kaj aŭdante Esperanton, penante kompreni malfacilajn interesajn prelegojn, do mi elektis ne veni al kelkaj el la vesperaj aranĝoj. Mi partoprenis la nacian vesperon kie tre lertaj junuloj prezentis buntan muzikan programon.

Dum la semajno estis defio kunordigi la transportadon, ĉar la hoteloj estis tro longe for de la kongresejo por piediri. Do oni prenis la menditajn busojn aŭ oni mem mendis taksion. Kubo en diversaj manieroj estas tre malsama ol Danio.

Ni havis eblecon renkontiĝi kun kubanoj, vidi ilian tre belan (kaj varman) landon kaj flareti la kulturon. Mi multe dankas pro la gastigemo de la kubanoj.

*Mette Hjerting*



**Danaj membroj de Societo Zamenhof, la klubo de mecenatoj de UEA.**

Ĉiujare la prezidanto de UEA invitas la membrojn de Societo Zamenhof al akcepto en la Universala Kongreso.

Ankaŭ vi povas aliĝi al ĉi tiu societo, pagante al via peranto (Arne Casper, la sidanto en la bildo) aŭ rekte al UEA la duoblon de la kotizo por Membro-Abonanto.

# Kubaj travivaĵoj

Jen longega vojaĝo al Kubo kaj renkontiĝo kun belega urbo Havano kie okazis nia UK. Havano estas belega urbo, interesa de la historia vidpunkto. Ĝi bezonas tamen renovigon de siaj belegaj monumentoj kaj arkitekturo, kiu ŝajnas okazi tute malrapide. Tamen laŭ la rimarko de Astrid Birkbak oni nenie vidis grafitiojn, kaj ankaŭ mi ne memoras vidi tion. La surstrataj homoj estas ĝentilaj, kvankam temas pri tre malriĉaj homoj. Mi vizitis ankaŭ historiajn urbojn, Santa Klara,Trinidad kaj la belegan Cienfuegos, situantan ĉe la maro.

Niaj kubaj esperantistoj faris grandegan laboron por ebligi al ni evento-riĉan programon. Mi loĝis en la hotelo Palco kiu estis tute kontentiga kaj praktika por mi. Aparte impresis min nia Georgina Almanza, elstara kuba aktorino, fondinto de la teatra ensemblo "Las Mascaras" (La Maskoj). Ŝi estas eminenta esperantistino, kiu ankaŭ ĉi-foje impresis min per karisma deklamado de la Zamenhofaj poemoj. Mi estis kune kun multaj konataj kaj novkonataj homoj, ridis multe kaj tio ĉiam donas al mi neforgeseblan senton de privilegiita persono.

*Ana C.-Røssum*

# Kubismo estas superrealismo

Nia eta familio, konsistanta el mia koramikino, nia naskota infano kaj mi mem havis la plezuron viziti Kubon ĉi-somere okaze de du tutmondaj kongresoj – niaj unua UK kaj kvina IJK. Kiel gepatriĝontoj ni sentis nin preskaŭ egale apartenantaj al ambaŭ kongresoj. Tamen ni aparte antaŭvidis la IJK-n, ĉar kutime internacia junulara kongreso estas organizata multe pli de la lokaj kongresanoj ol UK, kiu povas ŝajni iom kiel granda UEA-akvario, kiun oni translokadas tra la mondo.

La etoso de Kubo estas tre fascina kaj tre malfacile priskribebla. Abundas paradoksoj en la kuba socio, tiel ke oni bezonas redifini konceptojn kiel libereco, laboro, posedaĵo, salajro ktp. por komenci kompreni kiel funkcias la ĉiutaga vivo. Ekzemple havi du specojn de valuto (unu ŝanĝebla al aliaj valutoj kaj unu nur interna) ne faciligas kompreni ekonomiajn aferojn. Kiel sperta kuba organizanto diris al mi: "Kubo estas la plej superrealisma lando en la mondo".

IJK komenciĝis post UK kaj jam la du semajnojn antaŭe ni pasigis en la bela lando. Do, ni jam estis multfoje spertintaj la superrealismajn rilatojn kaj tial fakte antaŭatendis pli aŭ malpli nenion pri la junulara kongreso. Ne miskomprenu, ni antaŭvidis la kongreson, tamen ne kapablis imagi kia ĝi estos. Apud la maro, ni sciis, sed kiel – ĉu dek metrojn, ĉu unu kilometron... ne eblis scii. Nelonge antaŭ UK, oni fakte ŝanĝis la kongresejon. En Kubo oni lernas ke valoras atendi ne antaŭatendante, kaj la pliparto de la junuloj fakte sukcesis fari tion, irante al la kongresejo ĝojaj kaj scivolemaj.

La karavano foriris sabate la 24an de julio en kvar busoj el hotelo en Havano, entute ni estis ĉ. 120-opo. Tipe de Kubo, ni iris en la dua buso sed alvenis la unuaj. La unua buso alvenis unu horon post ni, la kvara (neplanita) buso alvenis pli ol kvin horoj post ni. Iel ĉiuj havis sian propran bagaĝon, dormlokon, ekportis verdan brakrubandon kaj komencis esplori nian novtrovitan kongresejon.

Ŝajnis kvazaŭ ni alvenis en kaŝita paradizo. La maro estis kun belega plaĝo fakte nur dek metrojn de la loĝejo. La loĝejo mem konsistis el grupoj de kvaropaj ĉambroj unu apud la alia. Inter la grupoj de ĉambroj estis grandaj terenoj. Palmoj, arboj, floroj estis ĉie. Kaj kuloj. Fakte mi parolis kun homo kiu dum 24 jaroj kontraŭbatalis la kulojn per iu infera maŝino. Li ne ankoraŭ gajnis la batalon, tamen daŭre havas bonan laborlokon.

Nelonge post nia alveno ni trovis en angulo de la kongresejo la naĝejon kun drinkejo apude. Jen! ni pensis, post streĉa vojaĝo estus bone gustumi la lokan moĥiton kaj ni elpoŝigis monon. Tamen, surprize la drinkistoj nur rigardis niajn brakrubandojn kaj rifuzis havi monon. Ŝajne ni jam pagis por ĉio, nekredeble. Irinte al la manĝejo ni vidis la samon: Abundis manĝaĵoj kaj neniu volis monon de ni. Post du semajnoj pagante por ĉio, eĉ la necesejo, tio estis nova superrealisma sperto, tamen unu al kiu ni sufiĝe rapide alkutimiĝis.

Do, IJK estis en superrealisma kaŝita paradizo, tio estis ja bona kaj interesa komenco de la kongreso. Poste ni demandis nin, kio pri la programo? Je la alveno ni havis kelkajn paperojn kun listo de okazaĵoj, sed ne tre konkrete. Temis pri kursoj pri Esperanto kaj la hispana, dancado, grimpado, ludado en la naĝejo, iom pri Esperanto interrete, unu ekskurso al proksima urbo. Tuta alia afero ol UK aŭ eĉ pli kutima IJK kun programo plena de prelegoj, instruoj kaj diskutrondoj. Fakte ni estis ene de la kadro de la kongresejo tre liberaj – nova sperto en Kubo.

Manke de programitaj aktivecoj kongresanoj rapide interkonatiĝis kaj interrilatiĝis mem, kaj por mi tio estis la vera sukceso de la kongreso. Estis ĉirkaŭ dudek junaj kubanoj kun ni, la plejparto rilate al la kapabla kaj jam fama Esperanta muzikgrupo La Amindaj, kiuj koncertumis dum UK en Havano. Dum IJK la Amindaj ludis preskaŭ ĉiuvespere. Oni perceptis en ili samtempe kaj la scivoleman junecon kaj la nekonon de eksterlandanoj. Kelkaj el ili ne tre bone parolis Esperanton, multaj estis iomete timidaj, tamen ĉiam karibianoj kun varma sango. Ankaŭ inter la eŭropanoj estis grupo de tre junaj esperantistoj, nekutimigitaj al kongresoj, kiuj venis al Kubo kun siaj gepatroj. Ili similis al la junaj kubanoj pri scivolo kaj timido. Por mi estis plezuro vidi tiun tre junan parton de la kongresanoj interparoli kaj konatiĝi dum la kongreso. Sed ankaŭ estis pli aĝaj kongresanoj, kiel normale dum IJK, kaj pli aŭ malpli ĉiuj interparolis kun ĉiuj, kio ankaŭ estis tre bona sperto por mi mem, rilate al la generacia truo kio ofte troviĝas en Eŭropo.

Jam dimanĉe la naĝejo iĝis centra loko de la kongreso. Ĝi situis kvindek metrojn de la maro, enhavis drinkejon kaj tuj apude troviĝis teatrejo/koncertejo/dancejo. Tre malsimilis al normala kongresejo, sed en Kubo la normalo facile iĝas nenormala kaj inverse. Spertaj kongresanoj rigardis unu la alian kaj ridetis, poste ridis pri nia nova kongrescentro. Kion fari? Kompreneble, nenion! Jen ni jam havis tre agrablan renkontiĝejon, ĉiuj

bezonoj plenumiĝis facile, estus tre malfacile ŝanĝi ion ajn de la organizado. Do, kontente ni komencis la kongreson, trankvile movante nin inter la naĝejo, maro, drinkejo kaj manĝejo. Tamen, precipe en la akvoj ĉiuj trovis sin kune kaj liberaj de lingvaj kaj kulturaj bariloj. En la naĝejo homoj ripozis, parolis kaj … ludis! Estis pilko kaj du etaj golejoj, ĉiutage pilkludo evoluis nature. Homoj interkonsentis kiel ludi kaj ludis libere, ĝoje kaj kune.




En la maro estis belegaj koraloj kun fiŝoj. Ili komenciĝis du aŭ tri metrojn post la marbordo, kaj oni vere devis gardi al si la piedojn, ĉar koraloj tre bone tranĉas. Interese la koraloj kreskis en rifoj ekde la marbordo, rifoj kiuj ondis tien kaj reen laŭlonge la plaĝo. La rifoj ĉiam estis inter duonmetro kaj unu metro sub la marnivelo kiel vasta tereno. Tamen nevideble la fundo profondiĝis kun la distanco de la bordo. Kiam oni trovis limon de la rifo, ofte la koraloj falis rekte al la fundo kaj fascine videblis la fundo inter dek kaj dekkvin metroj sube. Ĉie estis fiŝoj kaj fiŝaroj. Tio vere tiklis la ventron!

Apud la naĝejo eblis prunti plonĝo-okulvitrojn kaj naĝoŝuojn. Sur la plaĝo troviĝis kelkaj akvobicikloj. Komence de la kongreso, ni nur rigardis la maron kaj naĝis iom. Post kelkaj tagoj la kongresanoj trovis la eblecojn vere esplori la koralojn kaj spontane organizis promenojn akvobicikle; ses- ĝis okope kun plonĝiloj por kvar aŭ kvin homoj. Tiel du ĉiam gvidis la akvobiciklon, kelkaj ripozis kaj kelkaj plonĝis apude. Mi tre rekomendas plonĝi inter koraloj, fiŝaroj kaj esperantistoj!

Finfine mi devas mencii la lingvon festivalon jaŭde, dum kiu ni surtabligis nigran panon kun haringoj, dana fromaĝo kaj brando por la plejparto de la kongresanoj. Granda sukceso, amuze ĉiuj kubanoj jam konis la faman danan fromaĝon kaj tuj manĝis, la aliajn aferojn ni devis klarigi iomete. Dankon al Tara por la pano, mi frostigis ĝin kaj ĝi estis tre bongusta.

*Rasmus Høyrup Jensen*

# Mallonga historio de Kubo



Por kompreni la nunan situacion de Kubo, oni devas konatiĝi kun la historio de la insulo. Jen koncizaj informoj kiujn mi trovis en *Lonely Planet:*

Jam antaŭ 4000 jaroj dum la ŝtonepoko en Kubo loĝis de homoj. En la jaro 1100 la enloĝantoj estis la Tainoj, kies posteuloj ankoraŭ troviĝas en la insulo. En 1492 alvenis Kristoforo Kolumbo rimarkis la eksterordinaran belecon de la insulo. En 1511 Diego Velasquez de Cuellar okupis la insulon nome de Hispanio, kaj sklavigis la indiĝenojn. Havano estis fondita en 1515 kaj en 1592 ĝi fariĝis ĉefurbo. Tiutempe la golfo de Meksikio estis daŭre invadata de piratoj kiuj rabis la hispanajn ŝipojn revenantajn el Sudameriko plenaj de oro, arĝento kaj spicoj. Tial la hispanoj konstruis kelkajn grandajn fortikaĵojn ĉirkaŭ Havano kaj ĉe la eniro de la haveno, por protekti la urbon.

Dum la 17-a kaj 18-a jarcento la urbo kreskis kaj la riĉuloj de la Nova Mondo financis belegajn palacojn kaj konstruaĵojn kiuj hodiaŭ de Unesko estas deklaritaj heredaĵo de la homaro. En 1750 Havano estis la tria plej

granda urbo de Ameriko, post la ĉefurbo de Meksikio kaj Limo, sed en 1762 ĝi estis invadita de britaj soldatoj kiuj restis en la insulo dum 11 monatoj. Tial Hispanio en 1763 komencis konstrui en Havano grandan fortikaĵon: Fortaleza de San Carlos, la plej granda en la Nova Mondo.

En 1820 Kubo fariĝis la plej granda produktanto de sukero, kaj la nove fondita Usono komencis pripensi kiamaniere ili povus konkeri la insulon. En 1808 Thomas Jefferson estis la unua el 4 Usonaj prezidantoj kiuj ofertis aĉeti Kubon, sed Hispanio rifuzis, kaj alportis eĉ pli da sklavoj precipe de Afriko, sed ankaŭ de Ĉinio kaj Meksikio kiel laborforto por la produktado de sukero.

La unua batalo por sendependeco startis en 1868, sub gvidado de Carlos Manuel de Céspedes, farmisto, juristo kaj poeto, kiu donis liberecon al siaj sklavoj, sed mortis dum la batalo, kiu finiĝis per akordo, per kiu la batalantoj tamen nenion akiris.

En 1895 startis la dua batalo por sendependeco sub gvidado de José Martí, poeto kaj patrioto kun grandaj vizioj. Kiel 16-jaraĝa li estis enkarcerigita dum la unua batalo por sendependeco, kaj poste li uzis 20 jarojn por formuli siajn revoluciajn ideojn, kiel rifuĝinto ekster Kubo. Li revenis starigante armeon de 40.000 homoj, kaj certe fariĝus la unua prezidento de Kubo, se li ne estis mortpafita dum la batalo, kaj fariĝis heroo kaj martiro. Samtempe Usono serĉis pretekston por invadi la insulon, kaj sendis sian plej grandan militŝipon Maine al Havano, por "protekti la usonajn civitanojn". La 15-an de februaro 1898 okazis eksplodo en la ŝipo kaj 258 usonaj soldatoj estis mortigitaj. Usono ofertis 300 milionojn da dolaroj al Hispanio, kiu denove rifuzis. Tiam Usono konkeris la insulon. Por mildigi la kubajn naciistojn, Usono ofertis preskaŭ-sendependecon, preninte por si mem la rajton milite interveni, kiam ajn tio ŝajnos konvena. Tiamaniere Usono rajtigis al si la militan areon de Guantánamo por "protekti" siajn strategiajn interesojn en la regiono de Panama kanalo. Kubo fariĝis dependa de Usono politike kaj ekonomie.

Fine de 1920 usonaj firmaoj posedis 2/3 de la tero kaj la plej grandan parton de la mineralaj resursoj. 20.000 usondevenaj riĉuloj loĝis en Havano. Dum la alkohol-malpermesa periodo en Usono, la mafio instaliĝis en Havano, kaj Al Capone komencis ekspluati la turistan sektoron konstruante hotelojn kun kazino kaj prostitucio. En la jaro 1933 Fulgencio

Batista estis elektita prezidanto, kaj komence establis ŝajnan demokration, sed dum la jaroj fariĝis reakcia kaj akordiĝis kun la gangsteroj. Post lia dua puĉo por daŭrigi la regadon, formiĝis revolucia grupo sub gvidado de karisma juristo kaj oratoro Fidel Castro kiu ne vidis alternativon al uzado de perforto por savi Kubon de la diktatoro. Li atakis kun grupo de 119 personoj la strategie gravan kazernon Moncada en 1953, sed batalantoj estis kaptitaj kaj torturitaj, multaj el ili pafitaj. Castro eskapis kun grupeto en la montara regiono sed estis kaptita kaj enprizonigita. Li defendis sin mem dum la proceso sub sia fama eldiro "la estonteco absolvos min" kiu eldiro poste fariĝis lia politika manifesto. Castro estis kondamnita al 15 jaroj de prizono.



En 1955 Batista, post sia fraŭda reelekto, por mildigi la opinion de la ekstera mondo liberigis ĉiujn politikajn malliberulojn, inkluzive de Castro, kiuj tuj fuĝis al Meksikio por ne riski sian vivon. De tie li planis sian revenon kaj kune kun 81 kamaradoj en novembro 1956 li enŝipiĝis en malnova ŝipeto Granma. La soldatoj de Batista trovis ilin kaj nur 12 personoj eskapis en la montaro Sierra Maestro, de kie ili reorganizis sin kaj gajnis simpation de la kamparanoj. Post longedaŭraj bataloj li venkis kaj Batista fuĝis al Dominika Respubliko, alportante 40 milionojn da dolaroj, ŝtelitaj el la ŝtata kaso.

Dum la postaj jaroj sekvis agrara reformo, limigo de privataj entreprenoj,

kaj naciigo de usonaj entreprenoj kio kaŭzis konflikton kun Usono kio fine kondukis al konata embargo en 1996. Estontece estos tre interese sekvi la evoluon de tiu belega insulo.

*Ileana Schrøder*

# Elektojaro de UEA

La Komitato de UEA povis efike eklabori en sia unua kunsido en Havano sabaton, la 17-an de julio, ĉar diference de kunsidoj eĉ en pluraj eŭropaj UK-oj, ĝi havis kvorumon tuj je la komenco. Ĉeestis komence 26 komitatanoj; fine de la kunsido la nombro estis jam 36, nome 32 komitatanoj A, 3 komitatanoj B kaj unu intertempe elektita komitatano C.

La ĉefa tasko en la sabata kunsido estis la elektoj. La Komitato voĉdonis per sekreta baloto pri la proponoj de la Elekta Komisiono, kiujn ĝi ricevis jam en majo. Unue estis elektitaj komitatanoj C. Ĉiuj ses kandidatoj sukcesis en la voĉdonado. Por Loes Demmendaal voĉdonis 24, kontraŭis 1 kaj 2 sindetenis; Paŭlo Branco ricevis respektive 21, 4 kaj 1; Jean Codjo 20, 4 kaj 2; Josep Franquesa Sole 20, 5 kaj 1; Stefano Keller 20, 0 kaj 6; kaj Marcel Delforge 19, 1 kaj 6.

Sekvis la elekto de la Estraro por la periodo 2010-2013. Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto per 26 por, 2 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario 27, 4 kaj 1 voĉon. Same kiel antaŭe, Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal estis reelektita kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28, 2 kaj 2 voĉoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Gutierrez pri landa kaj regiona agado (respektive 26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri scienca kaj faka agado (23, 5, 4). Kvankam ne en la tuj antaŭa periodo, Gutierrez estis estrarano jam pli frue dum unu mandato kaj Wandel dum du mandatoj.

Kiel komitataj reviziantoj estis elektitaj Paŭlo Branco kaj Marcel Delforge unuanime. Ambaŭ ricevis 29 porajn voĉojn; du sindetenis. Simile estis elektitaj la membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeckt ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3.

*[La Balta Ondo]*

# “Tutmonda Esperanto”

Dum la UK kunvenis la nova asocio Tutmonda Esperanto por tiuj kiuj kredas ke Esperanto estas regula kaj sen esceptoj, kaj devas resti tia.

Ekde la tridekaj jaroj (Kalocsay-Baghy) daŭras konstanta diskuto pri la koncepto “neologismoj” en nia lingvo. Ĉu ni devas akcepti konstantan kreadon de novaj vortoj, anstataŭ vortoj, kiuj jam ekzistas en formoj facile kompreneblaj? Grava kontribuon al tiu demando faris nia elstara verkisto Claude Piron en sia verko “La Bona Lingvo”.

La prelego dum la Havana kongreso pritraktis tiun temon, bedaŭrinde kun la kutima tempomanko, tamen kun konsiderindaj kontribuoj de Renato Corsetti kaj José Antonio Vergara. Iel ĝi estis daŭrigo de la diskuto kiun Anna Löwenstein komencis antaŭ kelkaj monatoj en revuo Esperanto, pri rajto de verkisto ĉiam krei novajn vortojn, kiu elvokis impetan disputon.

Multege estas dirite por kaj kontraŭ. Ĉi tie mi mencias la opinion de Renato Corsetti kontraŭ la multaj novaj vortoj: se ni daŭre deziras, ke Esperanto estu facile akirebla lingvo por ĉiuj homoj de la mondo, ne taŭgas la konstanta kreado de novaj vortoj (kutime de eŭropa deveno), ĉar tio kreas novan konsiderinde grandan malfacilaĵon por homoj el aliaj lingvaj teritorioj – novaj vortoj kiuj neeviteble devos esti lernitaj. Persone mi krome aldonas, ke tiu evoluo ne kongruas kun la ideoj de Zamenhof, kiu pere de enkonduko de prefiksoj kaj sufiksoj deziris nepre plisimpligi la lingvon por ke oni ne bezonu lerni tro multe da specifaj vortoj.

Jen kelkaj ekzemploj:

| *nova vorto* | *jam ekzistanta vorto* |
|---|---|
| adolesko | kreskaĝo, plenkreskado |
| aeroplano | aviadilo |
| aerodromo | flughaveno |
| liva | maldekstra |
| magra | maldika |
| olim | iam, antaŭ longe, antaŭe |
| signaturo | subskribo |

Sendube tiu diskuto pludaŭros – espereble kun bona solvo.

*Arne Casper*



LKK kun la transdonita flago

# Paperaj gazeteltondaĵoj

Junio:

Jernbanefritid: Nye tiden i IFEF (novelektita estraro en IFEF).
Sjællandske, Næstved: Rilate aĉeton de domego fare de Ole Blaust (malnova soldata hejmo KFUM kiel Esperanto-lernejo).

Julio:

Sjællandske, Næstved, sama temo.
Weekendavisen: Artikolo pri lingvoj mencianta Esperanton.
Sjællandske, Næstved: Krucvortenigmo.

Aŭgusto:

Ugebladet, Næstved, Asocia registro.
Hjemmet: Krucvortenigmoj, sama numero en du diversaj.
Frederiksborg Amts Avis: Artikolo de kaj pri Peter Weide, kiu instruis Esperanton en Ĉinio.

Ni daŭre insiste instigas vin sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

# Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.
Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenchoroj bonvolu informiĝi ĉe la sekretario. Rigardu ankaŭ la hejmpaĝon: http://www.esperanto-i-naestved.dk.

***Okazos:***

Ve 10.09: DEFA-kunveno kun rakontoj pri la IFEF-kongreso, Sofio kaj la UK, Havano. Interesa ankaŭ por nefervojistoj.
Ve 01.10: Danlingva prelego de Zita Garbaravicienė kaj Ole Blaust, i.a. pri ilia plano pri Esperanto-lernejo en ĵus aĉetita domo en Næstved.
Ve 15.10: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.
Ve 22.10: Pritrakto de ĉapitro 36 de *Faktoj kaj Fantazioj*.
Ve 05.11: Danlingva prelego de Lizeta, filino de tre konata kopenhaga paro, pri sia Esperanto-vivo.
Ve 12.11: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.
Ve 19.11: Pritrakto de ĉapitro 37 de *F+F.*
Ve 10.12: Jul-aranĝo.

***Okazis:***

La tradicia somera ekskurso okazis 12.06. kun partopreno de pluraj kopenhaganoj. Ni komencis en Rødvig, sed la terura ventego fuĝigis nin al la Stevns-fortikaĵo, kies malvarma interno ne allogis nin pro la mankanta ekstera varmo. Ni iris al Højerup, kie ni vizitis la du preĝejojn kaj la interesan muzeon. La posta lunĉo finis la oficialan parton de la ekskurso, kiun ni tamen opiniis bona kaj ujutna.

# Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, chatterjeebetty@hotmail.com. La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas **ĉiun lundon ekde la 19:00** en Tomsgårdsvej 35. Notu la pli fruan komenciĝon! Ni troveblas ankaŭ en Facebook ĉe "Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo".

*Septembro*

6 Ole Therkelsen prelegos pri la kongresaj paroladoj de Zamenhof.

13 Kiu estas la plej vidinda vidindaĵo de Kopenhago? Jen ege debatinda temo. Tial prezentu vian plej ŝatatan. Dube estus, ke ni tute konsentiĝos, tamen ne gravas, ĉar ni multe informiĝos kaj parolos.

20 Okaze de la tago de paco la 21-an de septembro kaj la Eŭropa tago de Lingvoj la 26-an de septembro oni planas teman vesperon pri tiuj ĉi temoj kunlabore kune kun DEA kaj DEJO.

27 Kia esperantisto VI estas? http://kisa.ca/kvizo/.

*Oktobro*

4 Studgrupoj pri gramatiko, la libro Marvirinstrato kaj kvizoj.

11 Bent Jensenius dialogigos nin pri diversaj ĉiutagaj aŭ malĉiutagaj situacioj, ekzemple tiuj, kiuj povus okazi dum la venontjara Universala Kongreso....

18 Divenkonkurenco 'Pri kiu aŭ pri kio mi parolas?' Ĉiu unu post la alia koncize priskribos misterulon aŭ misteraĵon , kaj ni poste divenos pri kiu/kio la priskribanto parolis.

25 Studgrupoj.

*Novembro*

1 Prelego. Mathias Dalmose pri sia vojaĝo al Japanio kaj la travivaĵoj ĉe Oomoto.

8 Kultura Vespero. Kulturo estas malkonciza koncepto tial: Venu paroli pri ŝatata filmo! Prezentu belegan pentraĵon! Rakontu pri novelo! Igu nin kanti esperantan rokan kanton! Surprizu nin per io ajn – nur venu kulturumi!

15 (planota)

22 Studgrupoj.

# Somera Esperanto-Studado

En 2010 SES okazis en Slovakio en urbo Piestany.

Jam aprile mi komencis aktivi en la reta studejo lernu.dk. Tiu loko povas daŭre doni al mi defiojn. Mi povas fari gramatikajn ekzercojn kaj ekzameni min mem. Mi ekvidis anoncon pri tiu SES, vidis la liston de partoprenontoj kaj decidis iri tien por altigi mian lingvan nivelon.

Post gramatika testo ni grupiĝis. Marta Kovacs el Hungario gvidis nian grupon, donis al ni plej diversajn taskojn, ni ludis, diskutis certajn temojn, kaj kelkaj prezentis interesan prelegeton. Kiam ni traktis poemojn mi ne kapablis kontribui. Poste mi konstatis laŭ la atestilo pri 26-hora kurso, ke ĝi estis C1-nivela. Ni estis bonvenaj viziti la aliajn grupojn por eventuala ŝanĝo. Pro la ekzamenoj ĉirkaŭ kvarono de nia grupo portempe forestis.

Antaŭtagmeze ni studis. Posttagmeze ni ekskursis. Vespere estis diversaj distroj. Peter Balaz enkondukis. Ĉarma angleparolanto interpretis honore al grupo de komencantoj. Ni estis 120 homoj el tre diversaj landoj, ekzemple Usono, Ĉinio kaj Britio. Ni loĝis en hotelakadmio, mi en ĉambro kune kun franca virino.

La oficialaj EKZAMENOJ okazas ĉe edukado.net. Al Katalin Kováts mi sendis aliĝilon kaj pagis kotizon de 72 eŭroj. Zsófia Kóródy surloke servis nin per antaŭpreparaj ekzercoj. Ĝuste tiuj agoj estis tre viglaj, interesaj kaj amuzaj, sed samtempe iom nervozigaj.

Mia meznivela ŝtupo trapasis unue kvaronhoran parolan ekzamenon laŭ taskoprezento. Poste venis aŭda kompreno de sonregistraĵo. Fine ni havis skribajn taskojn dum 3 horoj.

Tiu lingva ekzamensistemo *ORIGO* estas aranĝita laŭ la samaj postuloj kiel por la aliaj lingvoj. Pri tio oni povas legi en la libro, ESPERANTO de nivelo al nivelo, eldonita en 2008. Sur la unua paĝo oni vidas la kunlaborantajn homojn, kiuj verkis, lektoris, redaktis/esperantigis kaj angligis la enhavon. Plej multaj el ili estas hungaroj, ĉar la evoluo okazis en universitato en Budapeŝto.

*Jytte Sunekær*

# PIV en la reto!

Unu el la plej famaj Esperanto-verkoj de lastaj jardekoj certe estas "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto", mallonge PIV. La organizo Edukado@Interreto (E@I) kunlabore kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) intencas krei retan kaj senpagan version de la fama PIV – Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Por tiu celo estis jam subskribita kontrakto, laŭ kiu E@I kreos la retejon kaj SAT disponigos la enhavon – la elektronikan version de la fama vortaro.

Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa difin-vortaro en Esperanto, sed bedaŭrinde pro sufiĉe granda kosto la papera eldono ĝis nun estis havebla nur por relative malgranda grupo de Esperanto-parolantoj. Post apero de la reta versio la situacio tute ŝanĝiĝos, la vortaron povos uzi tute senpage ĉiuj uzantoj, kiuj havas aliron al la interreto.

La adreso de la nova projekto estos www.vortaro.net. Ĝis apero de PIV ĉe tiu ĉi adreso ĉi tie vi povos trovi ĉiujn bazajn informojn pri la projekto, la projekt-fluo kaj eblon finance kontribui al la projekto.

La projekto postulos grandan laboron, certe kelkmonatan laboron de kelkaj profesiuloj. Ĉefa defio de la projekto estas la ĝusta transpreno de ĉiuj datumoj, ĉar la programo, per kiu estis ĝis nun kreata PIV estas jam eksmoda, tre malnova kaj ne taŭga por simpla reta transpreno.

La projekto de reta PIV havas pli altajn ambiciojn, ol esti nur simpla cifereca versio de la papera eldono. Ĝi havas pli grandan potencialon, kiun la kreantoj de la retejo volus plene eluzi. La retejo havos forumon por ĉiu unuopa vorto, kiu ebligos viglan diskuton pri diversaj terminoj. Ĉiu povos kontribui, proponante eblajn novajn esprimojn, taŭgajn uzojn de certaj vortoj ks. Laŭ la plano la retejo estos uzebla ne nur per komputiloj, sed ankaŭ per poŝtelefonoj. Estonte plej verŝajne eblus aranĝi, ke la vortaro estu uzebla ankaŭ ekster la reto, kiel instalebla programo.

E@I nun lanĉas donac-kampanjon por kolekti la bezonatan sumon de 10.000 EUR. Se vi opinias la retan PIV subteninda iniciato, ni petas vin helpi ĝin konstrui. Kaze de sukcesa kampanjo la retejo aperos jam ĉi-jare. Pri la aktuala stato de donacoj ni ĝisdate informados en la retejo kaj sendante retmesaĝojn al donacintoj.

*www.vortaro.net*

# Nur 0,49 kronojn

Tiu ĉi informo turnas sin precipe al niaj membroj, kiuj ankoraŭ ne estas individuaj membroj de UEA, Universala Esperanto-Asocio.

UEA *venis en la mondon* en 1908, antaŭ 102 jaroj, kreita kiel konstanta bazo por la disvastigo de, kaj batalado por nia lingvo. Jarcento pasis kun venkoj kaj malvenkoj, sed UEA ĉiam estis la vera fundamento por sennombre da aranĝoj. Ĉi tie ni nur mencias la Universalan Kongreson UK – la 95-an ĉi-jare en Kubo kaj venontjare la 96-an en Kopenhago.

La ekzisto de UEA dependas de ĝiaj membroj kaj precipe de la individuaj membroj – ĉar estas elspezige havi oficejon kaj dungitaron en Roterdamo.

En Danio multaj el niaj membroj estas individuaj membroj de UEA, - preskaŭ 100 – sed kompreneble ni povos facile esti ankoraŭ pli multaj. Kaj kiom kostas esti membro? Kostas 180 kronojn jare (en 2010) aŭ 49,3 oerojn tage, - tiamaniere ni apogas kaj subtenas UEA finance kaj morale. Memoru ke UEA estas en konstantaj rilatoj kun UN kaj Unesko, por tiamaniere progresigi nian aferon internacie.

Kiel individua membro vi ricevas la Jarlibron kun ĉiuj informoj pri la Movado. Se vi deziras, eblas ankaŭ pagi ankoraŭ 270 kronojn (en 2010),por ricevi la revuon "Esperanto" 11 fojojn jare kaj per tio konstante esti ĝisdatigita pri tio kio okazas en la movado.

Se vi ankoraŭ ne estas individua membro de UEA kaj povas malhavi 49,3 oerojn tage, bonvolu kontakti min. Mi havas la plezuron reprezenti UEA en Danio.

Arne Casper (tel. 2140 8487, rete arnecasper@dbmail.dk)

# Bildoj de la Internacia Tago en Kopenhago

La 29-an de aŭgusto okazis en Kopenhago la tradiciiĝinta Internacia Tago, ĉi-jare pli granda ol iam antaŭe. Same tradicie, KEK havis tie budon. Jen deĵoras Bent Jensenius, Betty Chatterjee kaj Simon Shine.







"Kopenhago celebras diversecon" diras la rubandego – uzante unusolan lingvon. La Internacia Tago blokis la ĉefstraton Nørrebrogade kaj estis inaŭgurita per skotaj sakŝalmoj.




Homoj venas al Kopenhago el la plej nekredeblaj lokoj. Jen du etnaj jutlandanoj: Finn Østerbæk kaj Kamma Tranum deĵorantaj en la budo de KEK.